

Esperanto por UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 50, januaro-februaro 2021




Universala Esperanto-Asocio

UEA markis cent jarojn da kunlaboro kun internaciaj organizoj en decembro 2020

Lastatempe, Universala Esperanto-Asocio festis cent jarojn da kunlaboro kun internaciaj organizoj.

Oni starigis la Ligon de Nacioj post la Unua Mondmilito kun ĉefa mandato konservi la pacon per solvado de disputoj per paca negocado. Ĝia Ĝenerala Asembleo kunvenis unuafoje la 15-an de novembro, 1920, en Ĝenevo. Ĝi havis entute 48 membrajn ŝtatojn.

Semajnojn poste, la 9-an de decembro, propono de rezolucio estis prezentita al la Asembleo fare de dek unu el tiuj ŝtatoj, kiuj rekomendis la instruadon de Esperanto kiel dua lingvo en lernejoj tra la mondo, tiel ke ĉiuj infanoj kresku kun almenaŭ du lingvoj: la propra, plus “facila rimedo de internacia komunikado.” La rezolucion prezentis la persa delegacio. Inter ĝiaj iniciatintoj estis la svisa klerulo kaj internaciisto Edmond Privat, gvidanto en Universala Esperanto-Asocio kaj poste ĝia prezidanto.



Reformulita versio de la propono petis raporton pri la progreso de Esperanto, kiun poste preparis la Vica Ĝenerala Sekretario de la Ligo, Inazo Nitobe. La raporto, kiu estis favora al Esperanto kaj enhavis analizon de lingvaj problemoj inter ŝtatoj, akompanis la proponon kiam oni reenkondukis ĝin en la dua Asembleo en 1921. Dek tri membraj ŝtatoj kune subtenis la proponon: Albanio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Finnlando, Hindio, Japanio, Kolombio, Persio, Pollando, Rumanio, Sud-Afriko, kaj Venezuelo.

En la jaro 1922 oni organizis en Ĝenevo konferencon pri la instruado de Esperanto en lernejoj; ankaŭ ĝi favore raportis pri la eduka valoro de la lingvo. Pli malfrue tiujare, la Ĝenerala Asembleo transsendis la tutan demandon al la nove kreita dekmembra Komitato pri Intelektala Kunlaboro, la antaŭulo de Unesko. Kontraŭstaro sub gvido de la franca delegacio kondukis al ĝia malakcepto per ses voĉoj el dek.

Kiam la novaĵo atingis la Universalan Kongreson de Esperanto, kunvenanta en Nurembergo en la somero de 1923, la 5000 parolantoj de Esperanto kiuj ĉeestis akceptis la informon per nekredemo kaj ridado.

Bedaŭrinde, kaj spite postan diplomatian manovradon ene de la Ligo, la demando pri Esperanto en la lernejoj estis abandonita al morto. Tamen, kunlaboro kun la Ligo daŭris, kaj kondukis en 1924 al la rekono de Esperanto kiel “klara” lingvo por telegrafio.

Universala Esperanto-Asocio, kaj la Esperanto-movado ĝenerale, ne rezignis pri la pli granda demando. Tamen, nur en decembro 1954 rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko fine rekonis, ke la laboro de la Esperanto-movado por intelekta interŝanĝo “respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko”, tiel liberigante la vojon al starigo de konsultaj rilatoj kun UEA kaj fine starigo de similaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj pere de ties Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK). Tiu kunlaboro kun Unesko kaj EKOSOK daŭras ĝis hodiaŭ. La Asocio havas siajn reprezentantojn apud Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj en Parizo, Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno kaj membras en la estraro de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj (NROj) en Konsultaj Rilatoj kun EKOSOK.

Nia Informilo atingis sian kvindekan numeron

Per la nuna numero de la Informilo, ni atingis etan mejloŝtonon: la kvindekan numeron en la serio. La informilo estas nun eldonata en tri versioj – Esperanta, anglingva, kaj franclingva – sub redakto de nia reprezentanto al Unuiĝintaj Nacioj, d-ro Humphrey Tonkin. Gratulmesaĝo de la prezidanto de la Asocio d-ro Duncan Charters atentigis pri la informilo kaj la daŭranta kunlaboro kun UN. Temas pri “jaroj de agado,” skribis d-ro Charters, “tiel ke Esperanto estu rigardata kiel natura kontribuanto al reciprokaj aktivecoj kaj celoj” inter Universala Esperanto-Asocio kaj Unuiĝintaj Nacioj “ne surbaze de politikaj ideologioj sed surbaze de la esence komuna vojo por plibonigi interhoman kaj internacian harmonion.” Ni antaŭvidas pliajn jarojn de kunlaboro estontece.

Rezolucio alvokas al pli da multflankismo kaj atento al lingva politiko en UN

La Membraj Ŝtatoj de Unuiĝintaj Nacioj devas “pli forte kaj celkonscie” kunlabori, kaj civilsociaj organizoj devas subteni tiun kunlaboron “pli konscie kaj insiste”, laŭ rezolucio akceptita de la *Monda Festivalo de Esperanto*, kiu kunvenis virtuale tra trimonata periodo kiu komenciĝis en junio kaj finiĝis en septembro pasintaj. Pluraj miloj da parolantoj de Esperanto, nepovante vojaĝi pro la pandemio, partoprenis tiun festivalon, kiu anstataŭis la ĉiujaran Universalan Kongreson de Esperanto, kiun oni planis okazigi en Montrealo komence de aŭgusto. Partoprenantoj en la Festivalo estis el 97 landoj.

La rezolucio promesis “la pludaŭron de la plurjardeka kunlaboro de la Esperanto-movado kun la mondaj organizaĵoj UN kaj Unesko” kaj alvokis al Esperanto-parolantoj, ke ili varbu la subtenon de siaj registaroj al multflankismaj aliroj al mondaj problemoj. Ĝi laŭdis la komunumon de Unuiĝintaj Nacioj pro la progreso farita tra la pasintaj 75 jaroj, sed atentigis, ke multflanka kunlaboro estas “ankoraŭ nesufiĉa por superi la tutplanedajn krizojn kiujn ni nun frontas, kaj estas malhelpata de miskomprenoj kaj naciaj rivalecoj.” La estonteco, la rezolucio deklaris, “dependas de pli forta multflanka kunagado inter registaroj, en kunlaboro kun la tutmonda civila socio.”

La rezolucio rekomendis al Esperanto-parolantoj tra la mondo, ke ili “mobilizu sin al kunlaboro kun UN kaj Unesko je ĉiu nivelo,” ankaŭ pere de ties lokaj civitanaj asocioj.

Fine, ĝi atentigis Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon “pri la bezono de pli inkluziva lingvopolitiko, se ili volas mobilizi la tutmondan socion ĉirkaŭ siaj celoj, kaj pri la valoro de la internacia lingvo Esperanto” por atingi homojn en multaj landoj samtempe. La rezolucio atentigis, ke Unesko komencas uzi Esperanton tiumaniere en sia eldona programo.

La Festivalo inkluzivis, inter siaj 500 horoj da programoj, prelegojn kaj larĝan diskutadon pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo kaj la manieroj per kiuj parolantoj de Esperanto povos helpi por atingi tiujn celojn.

La Festivalon lanĉis speciala parolado de Fabrizio Hochschild, Ĝenerala Subsekretario kaj Speciala Konsilanto de la ĝenerala Sekretario pri la 75-a datreveno de UN. Under-Secretary-General and Special Adviser to the Secretary General on the 75th Anniversary of the UN.

La Konferenco de Ne-registaraj Organizoj emfazis la bezonon de pli bonaj rilatoj kun NROj dum la pandemio

Dum kunveno de NROj la 18-an de novembro pri alireblo al Unuiĝintaj Nacioj, Universala Esperanto-Asocio, komitatano de la Konferenco de NROj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj, solidariĝis kun aliaj NROj por emfazi la neceson de “adekvata aliro al kunvenoj, konferencoj, specialaj aranĝoj kaj dokumentado” dum la tempo de KOVIM, kiam tranĉiĝis la normalaj vojoj de kunlaboro.

La Konferenco aparte konsciis pri la neceso pli bone dividi ĝisdatajn “informojn pri reguloj, limigoj, kaj postuloj de UN” pri KOVIM, por eviti lastminutajn malpermesojn de NROj dezirantaj partopreni UN-kunsidojn.

Rezolucio aprobita la postan tagon de la komitato de CoNGO, kun partopreno de UEA-reprezentantoj Humphrey Tonkin kaj Spyros Papadatos, aludis al ĝenerala neceso de pli aktiva kunlaboro inter UN-organizoj kaj la civila socio. Siavice, CoNGO plivastigis sian retejon (ngocongo.org) por prezenti ampleksajn informojn pri reguloj kaj procedoj por la aliro kaj partopreno de NROj en la UN-sistemo.

UN-Tago 2020: “La mondo estas pli bona pro la ekzisto de UN, sed nesufiĉe pli bona.”

“La 24-a de oktobro, la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, markas la daton en 1945 kiam la Ĉarto de UN ekvalidis kaj UN formale ekestis. Sepdek kvin jarojn poste, ni retrorigardas al tiu tago kiel al unu el la plej grandaj atingoj de la homaro.” Tiel komenciĝis la mesaĝo de nia Asocio okaze de UN-Tago.

“Tamen,” la mesaĝo deklaris, “spite al la streboj de UN, la pasintaj sepdek kvin jaroj ne kondukis al proskribo de militoj, nek al mondo kie la homaj rajtoj estas adekvate respektataj, nek al sufiĉa progreso al kreado de daŭripova kaj inkluziva monda ordo. Miskomprenoj kaj komunikaj paneoj restas oftaj;

abundas malvido; kaj la mondo restas dividita de raso, religio, kaj naciisma maltolero de aliuloj. La mondo estas pli bona pro la ekzisto de UN, sed nesufiĉe pli bona.”

“Nia asocio,” la mesaĝo aldonis, “forte apogas la laboron de UN por trovi solvojn al tutmondaj problemoj, precipe en la pandemia krizo kiun ni nun trapasas. Ni iniciatis sisteman kampanjon por informi nian tutmondan komunumon pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo kaj ties graveco, kaj, tiucele, ni draste plifortigas niajn klopodojn mobilizi esperantistojn tra la tuta mondo.” UEA aperigis centpaĝan gvidilon al la Celoj en Esperanto. Oni vaste distribuas tiun ĉi gvidilon.

“Unuavice,” diris la mesaĝo, “ni kredas, ke multflankaj demandoj postulas multflankajn solvojn, en kiuj la naturo mem, la ordinara vivo de homoj, familioj kaj lokaj komunumoj, kaj homaj inventemo kaj kreemo povu ĉiuj kombiniĝi por krei pli bonan mondon.”

“Atingi tiujn celojn postulas aktivan komunikadon en spirito egaleca – tian kian ni celas per nia uzo de la Internacia Lingvo Esperanto. Nia komunumo subtenas Unuiĝintajn Naciojn jam de ties komenciĝo, kaj ni daŭrigos nian subtenon en la estontecon, ekzemplante kiel egaleco de komunikado kapablas antaŭenigi egalecan kaj daŭripovan komprenon. Ni nin dediĉas al daŭra partnereco kun Unuiĝintaj Nacioj kaj kun homoj de bona volo – “Ni, la Popoloj” – tra la tuta mondo.”

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.